



Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

N^o 2

Februaro, 2017

Karaj niaj Legantoj, jen estas dua ĉi jara numero de la oficiala organo de la Esperanto Societo de (glora urbo) Ŝikago – “Saluton!”: paŝo post paŝo ni obstine proksimiĝas al nia 150 seninterrompa monata numero (Majo, 2017).

Malsupra materialo informos vin pri la UEA agado, renkonto de niaj klubanoj kaj aktuala poemo de fama ukraina poeto. Agrablan legadon!
–La Redaktoro

Internacia Tago de la Gepatra Lingvo –Inf. Fakoj de UEA

La 21-an de februaro 1952 la polico pafmortigis en la universitato de Dako, ĉefurbo de la hodiaŭa Bangladeŝo (Orienta Banglujo) plurajn manifestaciantajn studentojn. Tiuj studentoj manifestaciis por ke oni agnosku la ekziston de ilia gepatra lingvo, la bengala (bangla), kiun oni volis forigi de la universitato favore al lingvo “pli granda”, parolata de la fortuloj de tiu momento.

Temas pri io, kio ripetiĝas, en diversaj formoj, daŭre tra la tuta mondo kaj tra la tuta historio. Ne nur en Orienta Banglujo, sed ankaŭ en pluraj eŭropaj landoj, kiel ekzemple en Nederlando, kie la registaro en 2015 aprobis planojn por laŭgrada forigo de la pozicio de la angla lingvo en la instruado - malfavore al la lokaj gepatraj lingvoj.

Tiuj ne estis unikaj okazaĵoj. Kaj en Orienta Banglujo kaj en Nederlando temas pri la sama logiko: “mi estas la fortulo, vi silentu kaj eventuale, se vi volas paroli, vi parolu mian lingvon”. Aliflanke kiel ĉiuj lingvistoj diras al ni (ni citas unu el ili, Ken Hale): “Kiam lingvo mortas, ni perdas grandan intelektan riĉecon, kvazaŭ oni faligis bombon sur la muzeon Louvre.”

Je la 17-a de novembro 1999 Unesko proklamis la 21-an de februaro la *Internacia Tago de la Gepatra Lingvo*. En 2007 ankaŭ la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj alvokis la membroŝtatojn por “Antaŭenpuŝi la konservadon kaj protektadon de ĉiuj lingvoj uzataj de la popoloj de la mondo.”, samtempe deklarante la jaron 2008 *Internacia Jaro de Lingvoj*.

En 2014 Unesko aperigis en sia retejo ankaŭ Esperanto-lingvan version de la mesaĝo de la Ĝenerala Direktoro, Irina Bokova.

Kiel rilatas al ĉio ĉi *Esperanto*? La du aferoj ja rilatas inter si, ĉar la kernaj valoroj de ĉi tiu tago, la multlingveco kaj la rajto de ĉiu homo paroli sian gepatran lingvon, estas ankaŭ la valoroj kiujn la movado por Esperanto defendas. Ni, la esperantistoj, volas neniun lingvon malaperigi, ni



volas, ke ĉiuj lingvoj plu ekzistu, en respekto de ĉies lingvaj rajtoj, kaj regu lingva justeco. Ĉi-cele de multaj jaroj *Universala Esperanto-Asocio (UEA)* solene kunfestas ĉi tiun tagon, interalie por substreki ke Esperanto ne estas eliminanto de lingvoj, kiel estas uzataj la lingvoj de grandaj ekonomiaj kaj militistaj potencoj.

Esperanto, fakte estas protektilo kontraŭ la malapero de lingvoj, kiel diris s-ino Vigdís FINNBOGADÓTTIR (prezidanto de la Respubliko Islando, 1980-1996):

“Estas jam tempo ke la diversaj nacioj komprenu, ke neŭtrala lingvo povus iĝi vera remparo por iliaj kulturoj

kontraŭ la monopolema influo de nur unu aŭ du lingvoj, kiel hodiaŭ tio pli kaj pli evidentiĝas. Mi sincere esperas, ke Esperanto rapide progresos por helpi ĉiujn naciojn de la mondo”.

Eble iu ankoraŭ demandas: “Kial ĝuste Esperanto?”. La kialo estas simpla. Malantaŭ Esperanto ne estas ŝtatoj, ekonomiaj sistemoj, imperiismaj strebadoj, nek popoloj, kies intereso estus la malaperigo de aliaj popoloj, ties lingvoj, aŭ akiro de iliaj merkatoj. Malantaŭ Esperanto estas nur bonvolaj homoj, kiuj celas justecon por ĉiuj kulturoj kaj ĉiuj lingvoj, en paco inter la popoloj.

“*Plifortigi la rajtojn de la parolantoj de ĉiu lingvo estas la celo, al kiu esence kontribuas Esperanto.*” (Prof. Robert Phillipson). Esperanto estas ilo akcelanta atingon de justa komunikado kaj tiel de justaj rilatoj inter etnoj, kulturoj, popoloj. “... Mi esperas, ke Esperanto daŭrigos la plenumadon de tiu duflanka rolo subtenante diversecon kaj kreante unuecon.” (Rita Izsák-Ndiaye, Speciala Raportanto de UN.)

Sekve Esperanto helpas ĉiujn pluvivigi sian lingvon. Ĉi tiu estas la klara mesaĝo, kiun esperanto-parolantoj el la tuta mondo volas sendi al ĉiuj tutmonde, la 21-an de februaro.

Oleksandr Oles (1878-1944)

–Preparis Araneo

La 3an de Januaro multajn ukrainiaj (kaj ne nur) inform-agentejoj publikis novaĵon pri eltombigo (ekshumado) de restaĵoj de fama ukraina poeto Oleksandr Oles (kune kun restaĵoj de lia edzino Kalina). Tio okazis sur la teritorio de unu el la plej famaj historiaj tombejoj de Prago (Ĉeĥio). Okazis, kiel okazis, la tuta proceduro estis plenumita laŭ la lokaj leĝoj. Dum tri semajnoj ukraina registaro, konsilante kun pragenepoj de poeto, loĝantaj en Kanado, re-entombigis restaĵojn de la poeto familio en Kijivo, Lukjana tombejo. Entombigon ĉeestis prezidento de Ukrainio P. Poroŝenko. Do, kiu estis Oleksandro Oles'?

O. Oles (vera familnomo Kandiba) estas fama ukraina poeto. Li naskiĝis en norda Ukrainio, studis veterinariion en Ĥarkivo, laboris en Ĥarkivo kaj Kijivo. En 1907 en Peterburgo, Rusio aperis la unua poemkolekto de la poeto, kiu famigis lin. Poste sekvis multaj aliaj. En 1919 post la venko de bolŝevistoj la poeto elmigris al Vieno, Aŭstrio kie li daŭrigis sian verkadon. Li mortis en Prago, Ĉeĥoslovakio. “Eŭropo silentis...” Tiu amara kaj samtempe drama refreno de Oleksandr Oles aperis en lia poemo “Memoru” en aŭgusto 1931. Li vivis tiam meze de Eŭropo, en Ĉeĥoslovakio, do havis la eblecon de interne vidi, kiel oni perceptis tie ĉion okazanta en lia gepatra Ukrainio. Evidente li ĝuste tiam sentis akre, ke neniu ne solvos grandajn kaj malgrandajn problemojn de ukrainoj, se ili mem ne solvos. Estis la jaro 1929. La mallonga historio de la Ukraina Popola Respubliko finiĝis antaŭ dek jaroj, kaj la stalinisma epoko antaŭsignis teruran katastrofon por Ukrainio. Ĝuste en 1929 komenciĝis la amasa ekstermado de la ukraina intelektularo. La devigita kolektivigado elradikigis kamparanojn, ekstermante “kiel klaso” la plej mastrumemam parton de ili. Kaj post du jaroj amasa mortmalsato (la Holodomoro de 1933) falĉos Ukrainion... La poeto kvazaŭ aŭguris tiun tragedion. Evidente estis momento, kiam la generacio de Oleksandr Oles dorlotis tamen esperon, ke Eŭropo helpos. Sed ĝi ne helpis. Bedaŭrinde okcidentaj ŝtatoj subtenis ne la junan ukrainan demokration, sed la rusan imperiismon, kaj Usono establis diplomaciajn rilatojn kun la Sovetio ĝuste dum la kulmino de la Holodomoro (en 1933). Ne helpinte Ukrainion, Eŭropo kaj Usono aldonis al si kapdoloron, ĉar ilia silentado nur fortigis la bolŝevisman reĝimon. La poemo de Oleksandr Oles estas nun tre aktuala. La sama estas nuntempa situacio dum la agresio de Rusio en Ukrainio. Ĉu Eŭropo ne havas efikajn instrumentojn de influo por tiuj, kiuj volas transformi Ukrainion en kolonion, ne haltante eĉ antaŭ masakro? Kaj ĉu Eŭropo ne deziras havi apude demokratian ŝtaton, sed ne fragmenton de la Eŭrazia spaco? La poemon “Memoru” elukrainigis Petro Palivoda, ukraina kaj esperanta poeto kaj tradukisto el Kijivo, ĉefurbo de Ukrainio, special por nia bulteno.

✱ **Memoru** ✱

Dum Ukrainio en morta batal'
La rajton de l'viv' kontraŭ bestoj defendis,
Nur volis kompaton pro sia fatal',
Eŭropo silentis.

Dum Ukrainio, lasita de Di',
La tuta plu sangis kaj plore lamentis,
Atendis ĝi helpo amikan por si,
Eŭropo silentis.

Dum Ukrainio en jugo el fer'
Servutis kaj plugis, ĝin vundoj turmentis,
Eĉ rokoj sin movis pro tiu sufer',
Eŭropo silentis.

Dum Ukrainio en sangrikoltad'
Por la torturant' sian morton jam sentis,
Eĉ vortoj mutiĝis pro nigra malsat',
Eŭropo silentis.

Dum Ukrainio la vivon sen bon'
Malbenis kaj tombon prezentis,
Eklarmis eĉ fia malica demon',
Eŭropo silentis.

–22.08.1931



Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave., Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn
Membro – Hans Becklin

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
Familia membro: \$30,
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website. Gifts are welcome also.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

1350 N. Wells St., Ŝikago. Bonvenon!

28an de Februaro 7:00-9:00pt –
Pri sia Vojaĝo Rakontas Hanso

28an de Marto 7:00-9:00pt –
Kaliforniaj Vitejoj

Vizitinto –Inf. L. Kordylewski

Post la
Kristnaska
Festo 2016
aperis en
Ŝ i k a g o
s u b i t a
vizitanto,
k i u
bedaŭris ke
li mistrafis
n i a j n



kunvenojn. Paĉjo Lijvret estas eksterordinare lerta esperantisto, loĝanta en Ann Arbor, MI, poligloto, monda vojaĝanto – tre interesa junulo. Li promesas, ke li baldaŭ reaperos en Ŝikago denove por renkontiĝi kun nia Societo (vd foton).